

## 25 ŜTELITA KAKTO

"Mi rakontos do al vi," diris sinjoro Kubát, "kio okazis al mi la nunjaran someron." "Mi estis en somerloĝejo, tia kiaj la somerloĝejoj jam estas: sen akvo, sen fiŝoj, entute sen ĉio; sed kompanse estas tie forte reprezentita klerikala partio, lokbeliga societo kun vigla sekretario, perlamota industrio kaj poŝtoŝtanco kun maljuna kaj grandnaza poŝtestrino; mallonge, ĝi estas tia, kia ĉie aliloke.

Kiam do proksimume dum du semajnoj mi fordonis min tie al feliĉigaj kaj higienaj efikoj de la enuo per nenio interrompata, mi komencis flari, ke la lokaj klaĉulinoj kaj entute la publika opinio iel tro okupas sin pri mi. Kaj ĉar miaj leteroj venadis al mi suspektige bone glufermitaj, ke la tuta koverto dorsflanke nur brilis de araba gumo, mi diris al mi: Ha, iu malfermas miajn poŝtaĵojn; tondro al tiu poŝtestra oldulinaĉo! Sciu, la poŝtistoj scias onidire malglui ĉiun koverton.

Atendu, mi diris al mi; kaj jam mi sidis kaj per mia plej eleganta skribo mi komencis skribi: Ci timigilo poŝtestrina, ci grandnaza furio, ci kometo, ci babilulino scivola, ci vipero, ci raspilo, ci sorĉistino kaj tiel plu, plenrespekte Jan Kubát.

Aŭskultu, la ĉeĥa lingvo estas riĉa kaj preciza lingvo; unuspire mi elŝutis sur la paperon tridek kvar esprimojn, kiujn sincera kaj honesta viro povas uzi kontraŭ ĉiu sinjorino, ne fariĝinte tamen persona aŭ truda; poste kontente mi glufermis tion, skribis sur la koverton mian propran adreson kaj veturis en la plej proksiman urbon por enpoŝtigi ĝin.

Tagon poste mi rapidas al la poŝto kaj kun la plej agrabla rideto ŝovas la kapon en giĉeton. Sinjorino poŝtestrino, mi diras, ĉu estas ĉi tie iu letero por mi? - Mi akuzos vin, vi fiulo, ekfuriozis je mi la sinjorino poŝtestrino kun la plej terura rigardo, kiun mi iam vidis.

## UKRADENÝ KAKTUS

“Tak já vám povím,” pravil pan Kubát, “co se mně letos v létě stalo. Byl jsem na letním bytě, jak už ty letní byty jsou: bez vody, bez lesa, bez ryb, vůbec beze všeho; ale zato je tam silně zastoupena lidová strana, okrašlovací spolek s čilým jednatelem, perleťářský průmysl a poštovní úřad se starou a nosatou poštmistrovou; zkrátka je to tak jako všude jinde.

Tedy když jsem se tam asi čtrnáct dní oddával blahodárným a hygienickým účinkům takové té ničím nerušené nudy, začal jsem věřit, že mne mají místní klepny a vůbec veřejné mínění nějak v prádle. A protože mé dopisy mně docházely nápadně dobře zalepené, až se celá obálka na rubu zrovna leskla arabskou gumou, řekl jsem si: Aha, někdo otvírá mou poštu; hrom do té poštmistrovské báby! To víte, tihle pošťáci prý dovedou rozlepit každou obálku.

Počekej, řekl jsem si; a už jsem seděl a začal jsem svým nejuhlednějším písmem psát: Ty strašidlo poštmistrovské, ty nosatá fuchtle, ty kometo, ty treperendo zvědavá, ty zmije, ty rašple, ty ježibabo a tak dále, s úctou veškerou Jan Kubát.

Poslouchejte, tahle čeština je bohatá a přesná řeč; jedním dechem jsem na ten papír vysypal čtyřiatřicet výrazů, kterých může přímý a počestný muž užít vůči každé dámě, aniž by se stal osobním nebo dotěrným; pak jsem to spokojeně zalepil, napsal jsem na obálku svou vlastní adresu a jel jsem do nejbližšího města dát to do schránky.

Den nato běžím na poštu a strčím s nejlíbeznějším úsměvem hlavu do okénka. Paní poštmistrová, povídám, není tady pro mne nějaký dopis? – Já vás budu žalovat, vy ničemo, zadržela na mne paní poštmistrová s tím nejstrašnějším pohledem, který jsem kdy viděl.

SinJORINO poŝtestrino, mi diras komplete al ŝi, ĉu eble vi legis ion malagraban? - Kaj poste mi preferis forvojaĝi."

"Malgrava," diris kritike sinjoro Holan, ĉefĝardenisto de la Holbenĝardeno. "Ĉi tiu ruzo estis tre simpla. Mi povus rakonti al vi, kiel mi preparis kaptilon por ŝtelisto de kaktoj. Vi scias, la maljuna sinjoro Holben estas granda kaktisto, kaj lia kolekto de kaktoj, mi ne mensogas, povas valori tricent mil, se mi ne enkalkulas unikaĵojn. La maljuna sinjoro ŝatas, ke la kolekto estu alirebla al la publiko. Holan, li diras, tio estas nobla ŝat-okupo, tion oni devas vivteni en la homoj. Sed miavice mi opinias, se iu etkaktisto vidas, ni diru, tian oran Gruson por dek du centoj, tiam nur vane doloras lin la koro, ke li ĝin ne havas. Sed se la maljuna sinjoro tion volas, nu bone.

Sed iam pasintfoje, mi komencis rimarki, ke perdiĝas niaj kaktoj; kaj ne iuj el la belaj por la okulo, kiujn ĉiu volas havi, sed ĝuste la specialaĵoj; jen ĝi estis Echinocactus Wislizenii, jen Graesnerii, poste iu Wittia, importita rekte el Kostariko, poste ia nova specio, sendita de Friĉ, poste iu Melocactus Leopoldii, unikaĵo, kiun en Eŭropo neniu vidis jam pli ol kvindek jarojn, kaj fine Pilocereus fimbriatus el Sandomingo, la unua ekzemplero, iam veninta en Eŭropon. Aŭskultu, tiu ŝtelisto estis nepre iu specialisto!

Vi eĉ ne imagon havas, kiel la maljuna sinjoro furiozis. Sinjoro Holben, mi diras al li, simple fermu viajn florvitrejojn, kaj fino. - Ĝuste tion ne, kriis la maljuna sinjoro, tia nobla hobia estas por ĉiuj; vi devas kapti al mi tiun favan ŝteliston, eljetu la gardistojn, dungu novajn, alarmu policon kaj similajn aranĝojn. Tio estas malfacila afero; kiam ni havas tridek ses mil potetojn, ni ne povas starigi apud ĉiu unu gardiston. Almenaŭ mi dungis du emeritajn distriktajn polic-inspektorojn, por ke ili gardu; kaj ĝuste tiam perdiĝis nia Pilocereus fimbriatus kaj restis al ni post ĝi nur rondkaveto en sablo. Tio do ege ekkolerigis min kaj mi mem komencis spioni la ŝteliston de kaktoj. Vi devas scii, la veraj kaktistoj, tio estas io kvazaŭ sekto de derviŝoj;

Ale paní poŝtmistrová, povídám jí soucitně, snad jste nečetla něco nepřijemného? – A pak jsem raději ujel."

"To nic není," pravil kriticky pan Holan, vrchní zahradník Holbenovy zahrady. "Tahleta lest byla příliš jednoduchá. Já bych vám mohl povídat, jak jsem nalíčil na toho zloděje kaktusů. To víte, starý pan Holben je náramný kaktusář, a jeho sbírka kaktusů, já nelžu, může mít cenu tři sta tisíc, když nepočítám unikáty. Na to si starý pán potrpí, aby ta sbírka byla veřejně přístupná. Holane, říká, to je ušlechtilá záliba, to se má v lidech žít. Ale já si zas myslím, když nějaký malý kaktusář vidí, řekněme, takového zlatého Grusona za dvanáct stovek, tak ho jen zbytečně bolí srdce, že ho nemá. Ale když to starý pán chce, nu dobrá.

Ale tuhle vloni jsme začali pozorovat, že se nám ztrácejí kaktusy; a to ne nějaké ty na oko, co kdekdo chce mít, ale zrovna takové ty speciality; jednou to byl Echinocactus Wislizenii, podruhé Graessnerii, pak jedna Wittia, import přímo z Kostariky, pak jedna species nova, kterou poslal Friĉ, potom jeden Melocactus Leopoldii, unikát, který nikdo v Evropě neviděl už přes padesát let, a nakonec Pilocereus fimbriatus ze San Dominga, první kus, který kdy přišel do Evropy. Poslouchejte, ten zloděj musel být nějaký znalec!

To nemáte ponětí, jak starý pán zuřil. Pane Holbene, říkám mu, jednoduše své skleníky zavřete, a bude po ptákách. – A to zas ne, křičel starý pán, taková ušlechtilá záliba je pro všechny; musíte mně chytit toho prašivku zloděje; vyhoďte hlídače, najměte nové, alarmujte policii a takové ty krámy. To je těžká věc; když máme třicet šest tisíc hrníčků, nemůžeme postavit ke každému jednoho hlídače. Tak jsem aspoň najal dva revírní inspektory od policie na penzi, aby dávali pozor; a zrovna tehdy se nám ztratil ten Pilocereus fimbriatus a zbyl nám po něm jenom důlek v písku. Teda to jsem se dožral a začal jsem pást sám po tom zloději kaktusů. Abyste věděli, tihle praví kaktusáři, to je něco jako sekta derviŝů;

mi opinias, ke anstataŭ la barbo kreskas al ili dornoj kaj glokidioj, tiom ili pasiĝis por tio. Ĉe ni ekzistas du tiaj sektoj: Klubo de Kaktistoj kaj Ligo de Kaktistoj; kia diferenco estas inter ili, mi ne scias -mi opinias, ke unu kredas, ke la kaktaj havas senmortan animon, dum la aliaj prezentas al ili sangoferojn; sed mallonge, ambaŭ sektoj reciproke sin malamas kaj persekutas per fajro kaj glavo sur la tero kaj en la aero.

Mi vizitis do la prezidantojn de la du sektoj kaj tute konfidence demandis ilin, ĉu ili nur scieton havas, kiu povus - eble el la dua sekto - esti - ŝtelisto de la kaktaj de Holben. Kiam mi diris al ili, kiuj neordinaraj kaktaj perdiĝis al ni, ili deklaris kun plena certeco, ke sekve ne povis ilin ŝteli iu membro de la malamika sekto, ĉar tie estas nuraj fuŝuloj, mallertuloj kaj ignorantoj, havantaj eĉ ne ideon, kio estas tia Wislizen aŭ Graesner, ne parolante pri Pilocereus fimbriatus; kaj kio koncernas iliajn proprajn membrojn, - ili garantias por ilia honesteco kaj nobleco; ke ili ne kapablu ŝteli ion, escepte ian tian kaktajn; sed se iu el ili havus tiun Wislizen, certe li montrus ĝin al la aliaj por la adorado kaj religiaj orgioj, sed pri tio ili, la prezidantoj, nenion scias. Post tio ambaŭ honorindaj sinjoroj diris al mi, ke krom la du publike agnoskitaj aŭ tolerataj sektoj ekzistas ankoraŭ sovaĝaj kaktistoj, kaj laŭdire tiuj estas el ĉiuj la plej malbonaj; ili estas tiuj, kiuj pro sia pasiemo ne povas harmonii kun la pli moderaj sektoj aŭ kiuj entute omaĝas diversajn herezojn kaj perfortojn. Kaj ĉi tiuj sovaĝaj kaktistoj estas kapablaj je ĉio.

Kiam do mi ne sukcesis ĉe la du sinjoroj, mi surgrimpis belan aceron en nia parko kaj meditis. Mi diras al vi, plej bone oni meditas en branĉaro de arbo; tie oni estas iel apartigita, iom estas balancata kaj dume ĉion rigardas desur pli alta vidpunkto; mi opinias, ke la filozofoj devus vivi sur arboj kiel orioleoj. Kaj sur tiu acero mi elpensis tian planon. Unue mi vizitis sinsekve miajn konatajn ĝardenistojn kaj diris: junuloj, ĉu putras iaj viaj kaktaj? La maljuna sinjoro Holben bezonus ilin por siaj eksperimentoj.

já myslím, že jim místo fousů rostou ostny a glochidy, tak jsou do toho zažraní. U nás máme dvě takové sekty: Spolek kaktusářů a Sdružení kaktusářů; čím se od sebe liší, to nevím, - myslím, že jedni věří, že kaktusy mají nesmrtelnou duši, kdežto druzí jim přinášejí krvavé oběti; ale zkrátka ty dvě sekty se navzájem nenávidí a pronásledují se ohněm a mečem na zemi i v povětří.

Teda já jsem si zašel k předsedům těch dvou sekt a ve vsí důvěrnosti jsem se jich zeptal, nemají-li nějaké zdání, kdo by - třeba z té druhé sekty - ty Holbenovy kaktusy mohl ukrást. Když jsem jim řekl, které vzácné kaktusy se nám ztratily, prohlásili s největší určitostí, že teda je nemohl ukrást žádný člen té nepřátelské sekty, protože tam jsou jenom takoví svrabaři, hudlaři a nezasvěcenci, kteří nemají ani ponětí, co je to takový Wislizen nebo Graessner, neřkuli Pilocereus fimbriatus; a co se týče jejich vlastních členů, že ručí za jejich poctivost a ušlechtilost; že ti nejsou schopni něco ukrást, ovšem krom nějakého toho kaktusu; ale kdyby někdo z nich takového Wislizena měl, že by ho jistě ukázal těm ostatním k uctívání a náboženským orgiím, ale o tom jim, předsedům, není nic známo. Načež oba ti ctihodní páni mně řekli, že kromě těchto dvou veřejně uznaných nebo trpěných sekt jsou ještě divocí kaktusáři, a ti prý jsou ze všech nejhorší; to jsou ti, kteří se pro svou náruživost nemohli snést s těmi umírněnými sektami nebo vůbec holdují různým bludům a násilnostem. A tihle divocí kaktusáři prý jsou schopni všeho.

Když jsem tedy u těch dvou pánů nepochodil, vylezl jsem na takový pěkný javor v našem parku a přemýšlel jsem. Já vám říkám, nejlíp se přemýšlí v koruně stromu; tam je člověk tak jaksi odpoután, trochu se to s ním houpe a přitom se díváte na všechno z vyššího stanoviska; já myslím, tihle filozofové by měli žít na stromech jako žluvy. A na tom javoru jsem si vymyslel takový plán. Nejdřív jsem si oběhl své známé zahradníky a povídám: Mládenci, nehnijou vám nějaké kaktusy? Starý pan Holben by je potřeboval na ty své pokusy.

Tiele mi havigis al mi kelkcent malsanajn kaktajn kaj dumnokte mi enŝovis ilin inter kaktaron de Holben. Du tagojn mi silentis kaj la trian tagon mi metis en ĉiujn ĵurnalojn la jenan informon: La mondfamaj kolektoj de Holben en danĝero! Kiel ni sciiĝas, la granda parto de la unikaj florvitrejoj de Holben estis atakita de nova kaj ĝis nun nekonata malsano, enportita plej versimile el Bolivio. La malsano atakas precipe la kaktajn, daŭras iom da tempo latente kaj fine montriĝas kiel putrado de radikoj, kolo kaj korpo. Ĉar ŝajnas, ke la malsano estas tre infekta kaj rapide vastiĝas pere de ĝis nun nedifinitaj mikrosporoj, la kolektoj de Holben estis fermitaj.

Proksimume post dek tagoj - dum la dek tagoj ni devis resti kaŝitaj, por ke la kaktistoj ne disŝiru nin per amasaj demandoj - mi sendis al la ĵurnaloj la duan informon: Ĉu oni sukcesos savi la kolektojn de Holben? Kiel ni sciiĝas, profesoro Mackenzie en Kew difinis la malsanon, kiu aperis en la mondkonataj kolektoj de Holben, kiel specialan tropikan ŝimon (*Malacorrhiza paraguayensis* Wild.) kaj rekomendis surŝpruci la atakitajn ekzemplerojn per tinkturo de Harvard-Lotse. La ĝisnunaj eksperimentoj kun ĉi tiu kuracilo, nun grandskale farataj en la kolektoj de Holben, estas tre sukcesaj. La solvaĵo de Harvard-Lotsen estas ricevebla ankaŭ ĉe ni kaj en tiu kaj tiu magazeno.

Kiam ĉi tio aperis, sidis jam unu detektivo en tiu magazeno kaj mi ekkomfortis apud telefono. Post du horoj telefonis al ni la detektivo: Sinjoro Holan, jam ni havas lin ĉi tie. - Post dek minutoj mi tenis je la kolumo tian malgrandan hometon kaj skuis lin.

Sed, sinjoro, protestis tiu hometo, kial vi skuas min? Mi venis ja ĉi tien nur por aĉeti la konatan tinkturon de Harvard- Lotsen - Mi scias, diras mi al li, sed io tia ne ekzistas, same kiel ne ia nova malsano; sed vi venadis ŝteli kaktajn el la kolekto de Holben, vi damna fripono!

Dank' al Dio, elbalbutis la hometo, nenia tia malsano do ekzistas?

Takhle jsem sehnal pár set marodů a přes noc jsem je nastrkal do Holbenovy sbírky. Dva dny jsem byl zticha, a třetího dne jsem dal do všech novin tuhle zprávu: Holbenovy světoznámé sbírky ohroženy! Jak se dovídáme, byla velká část jedinečných Holbenových skleníků zachváčena novou a dosud neznámou chorobou, zavlečenou nejspíše z Bolívie. Nemoc napadá zejména kaktusy, probíhá po nějaký čas latentně a pak se projevuje jako hniloba kořenů, krčku i těla. Jelikož se zdá, že tato choroba je velmi nakažlivá a rychle se šíří dosud nezjištěnými mikrosporami, byly Holbenovy sbírky zavřeny.

Asi za deset dní – po těch deset dní jsme se museli skrývat, aby nás kaktusáři neroztrhali samými dotazy – jsem poslal novinám druhou zprávu: Podaří se zachrániti Holbenovy sbírky? Jak se dovídáme, určil profesor Mackenzie v Kew chorobu, jež vypukla ve světoznámých Holbenových sbírkách, jako zvláštní tropickou plíseň (*Malacorrhiza paraguayensis* Wild.) a doporučil postříkovati zachváčené exempláře tinkturou Harvard-Lorsenovou. Dosavadní pokusy s tímto lékem, které se nyní ve velkém měřítku provádějí v Holbenových sbírkách, jsou velmi úspěšné. Harvard-Lotsenův roztok lze dostat i u nás v tom a tom závodě.

Když tohle vyšlo, seděl už jeden tajný v tom závodě a já jsem se uvelebil u telefonu. Za dvě hodiny mně telefonoval ten tajný: Tak pane Holan, už ho tu máme. – Za deset minut jsem držel za límec takového malého človíčka a třepal jsem jím.

Ale pane, protestoval ten človíček, co se mnou třepete? Já sem jdu jenom koupit tu známou Harvard-Lotsenovu tinkturu – Já vím, povídám mu, jenže ona žádná není, tak jako není žádná nová nemoc; ale vy jste nám chodil krást kaktusy do Holbenovy sbírky, vy čerchmantský taškáři!

Zaplaťpánbůh, vyhrkl ten človíček, tak ona žádná taková nemoc není?

Kaj dek noktojn mi ne dormis pro timo, ke per ĝi infektiĝos miaj ceteraj kakttoj!" Do je la kolumo mi elportis lin en aŭton kaj veturis kun li kaj kun la detektivo en lian loĝejon.

Aŭskultu, tian kolekton mi ankoraŭ ne vidis; tiu hometo havis unu mansardan ĉambregon en Vysočany, nu proksimume trioble kvar metrojn, en angulo sur planko litkovrilon, tableton kaj seĝon, kaj ĉio cetera estis sole kakttoj; sed kiaj ekzempleroj kaj en kia ordo, vane oni serĉus ion similan. "Kiujn ekzemplerojn li ŝtelis de vi," diras la detektivo; kaj mi rigardis la friponon, kiel li tremas kaj glutas la larmojn.

Aŭdu, mi diris al la detektivo, ĝi ne havas tian valoron, kiel ni opiniis; diru en la direkcio, ke tiu sinjoro forportis ilin en valoro de kvindek kronoj kaj ke mi mem aranĝos la aferon kun li.

Kiam la detektivo foriris, mi diras: "Amiketo, do unue kunpaku al mi ĉion, kion vi forportis de ni. - Tiu hometo palpebrumis, ĉar li estis eklarmonta, kaj flustras: Mi petas vin, sinjoro, ĉu preferas mi povus pune sidi pro tio? Ne, mi krias al li, unue vi devas redoni, kion vi ŝtelis de ni. - Li komencis do elprenadi unu poteton post la alia kaj metis ilin flanken; ili estis proksimume okdek, ni eĉ ne sciatis, ke tiom mankis al ni; sed versimile li forportadis tion jam dum longaj jaroj. Por certigi mi alkriis lin: Kio, ĉu tio estas ĉio? Tiam li eklarmis; li elprenis ankoraŭ unu blanketan De Laitii kaj unu corniger'on, metis ilin al la ceteraj kaj singultis: Sinjoro, je mia animo, pli da viaj mi ne plu havas.

Tio ankoraŭ montriĝos, mi tondris, sed nun diru al mi, kiel vi povis forportadi ilin de ni. Tio estis jene, li balbutis kaj ĉe tio saltadis lia Adam-pomo pro ekscito. Mi... mi surpronis nome ĉi tiun veston... Kiun veston? krias mi. Tiam li ruĝiĝis pro ega embaraso kaj balbutis: Mi petas, virinan veston. Hometo, mi miras, kaj kial ĝuste la virinan veston? Ĉar, li ĝene parolis, mi petas, tian nejunan virinon neniu speciale atentis, kaj poste - li aldonis preskaŭ venke - la prudento diros al vi, ke pri io tia neniu suspektos virinon!

A ja jsem deset nocí nespal strachem, že ji dostanou mé ostatní kaktusy! Tak jsem ho za límec vynesl do auta a jel jsem s ním a s tím tajným do jeho kvartýru.

Poslouchejte, takovou sbírku jsem ještě neviděl; ten človíček měl jediný kumbálek v podkroví ve Vysočanech, no, asi třikrát čtyři metry, v koutě na zemi deku, stoleček a židli, a to ostatní byly samé kaktusy; ale jaké exempláře a v jakém pořádku, to teda aby člověk pohledal. Tak kterépak kousky vám ukradl, povídá ten tajný; a já jsem koukal na toho taškáře, jak se třese a polyká slzy.

Poslouchejte, řekl jsem tajnému, ono to nemá takovou cenu, jak jsme mysleli; řekněte na direkci, že ten pán toho odnesl za padesát korun a že si to s ním vyřídím sám.

Když tajný odešel, povídám: Tak, přítelíčku, nejdřív mně spakujte všechno, co jste si od nás odnesl. – Ten človíček vám mrkal, protože měl slzy na krajíčku, a šeptá: Prosím vás, pane, nemohl bych si to raději odsedět? Nic, křičím na něj, nejdřív musíte vrátit, co jste nám nakradl. – Tak on vám začal vybírat jeden hrnček po druhém a dával je na stranu; bylo jich asi osmdesát, – my jsme neměli ani ponětí, že nám toho tolik chybělo; ale nejspíš to odnášel už po dlouhá léta. Pro jistotu jsem se na něho rozkřikl: Co, tohle že je všechno? Tu mu vyhrkly slzy; vybral ještě jeden běloučkový De Laitii a jeden corniger, dal je k těm ostatním a vzlykal: Pane, namouduši, víc už jich od vás nemám.

To se ještě ukáže, hromoval jsem, ale teď mně řekněte, jak jste je od nás mohl odnášet. To bylo tak, breptal a přitom mu takhle skákal rozčilením ohryzek. Já... já jsem si totiž vzal na sebe ty šaty... Jaké šaty? křičím já. Tu se vám začervenal samými rozpaky a koktal: Prosím, ženské šaty. Človíčku, dívím se, a proč zrovna ženské šaty? Protože, zajíkal se on, prosím, takové obstarožní ženské si nikdo pořádně nevšimne, a pak – dodával skoro vítězně – to přece dá rozum, že nikdo nebude z něčeho takového podezřívát ženskou!

Sinjoro, la virinoj havas ĉiajn eblajn pasiojn, sed neniam ili faras al si kolektojn! Ĉu vi vidis iam virinon, kiu havus kolekton de poŝtmarkoj aŭ de skaraboj, aŭ inkunabuloj aŭ similaj aĵoj? Neniam, sinjoro! La virinoj ne havas la ĝisfundemon kaj - kaj tian manion. La virinoj estas tiom terure sobraj, sinjoro! Sciuj, tio estas la plej granda diferenco inter ni kaj ili: ke sole ni faras kolektojn. Mi opinias, ke la universo estas nur kolekto de steloj; ekzistas ia vira Dio, kaj tiu faras al si kolekton de mondoj; tial ili estas tiom ege multaj. Sakre, se mi havus tiom da mono kaj rimedoj kiel li! Ĉu vi scias, ke mi elpensas al mi novajn kaktajn? Kaj nokte mi sonĝas pri ili; ekzemple tia kaktus, kiu havas orkolorajn harojn kaj genciane bluajn florojn - mi nomis ĝin *Cephalocereus nympha aurea Racek* - mi nomiĝas ja Ráček, bonvolu scii; aŭ *Mamillaria colubrina Racek*; aŭ *Astrophytum caespitosum Racek*; sinjoro, ĉi tie estas miraklaj ebloj! Se vi nur sciuj -

Atendu, mi interrompis lin; kaj en kio vi forportadis la kaktajn? Mi petas, sur la brusto, li diris honteme. Ĝi tiel bele pikas. Aŭskultu, mi ne plu havis la koron por preni la kaktajn de li. Sciuj, mi diris al li, mi veturos kun vi al la maljuna sinjoro Holben kaj tiu jam forŝiros de vi ambaŭ orelojn.

Homoj, tio estis io, kiam tiuj du interkonatiĝis! Tutan nokton ili restis en la florvitrejo ĝis ili ĉirkaŭiris la tridek ses mil potetojn. Holan, diris al mi la maljuna sinjoro, tiu estas la unua homo, kiu scias apreci la kaktajn. Kaj antaŭ ol pasis monato, la maljuna sinjoro Holben kun ploro kaj benado ekipis tiun Ráček en Meksikion, por ke li kolektu tie kaktajn; ili ambaŭ sanktsankte kredis, ke tie kreskas *Cephalocereus nympha aurea Racek*. Antaŭ forpaso de unu jaro ni ricevis strangan sciigon, ke sinjoro Ráček tie pereis per bela kaj martira morto. Li trovis tie ĉe iuj Indianoj ilian sanktan kaktajn Ĉikuli, kiu estas, tion vi devas scii, la propra frato de Dio la Patro, kaj li aŭ ne riverencis antaŭ ĝi aŭ eĉ ŝtelis ĝin;

Pane, ženské mají všechny možné vášně, ale jakživly si nedělají sbírky! Viděl jste už někdy ženskou, která by měla sbírku známek nebo brouků nebo inkunábulí nebo takových věcí? Nikdy, pane! Ženské nemají tu důkladnost a – a – takovou tu náruživost. Ženské jsou tak děsně střízlivé, pane! Víte, to je ten největší rozdíl mezi námi a jimi: že jen my si děláme sbírky. Já si tak myslím, že vesmír je jenom sbírka hvězd; on je nějaký mužský bůh, a ten si dělá sbírku světů: proto jich je tak strašně mnoho. Hergot, kdybych já měl tolik místa a prostředků jako on! Víte, že si vymyslím nové kaktusy? A v noci se mi o nich zdá; třeba takový kaktus, který má zlaté vlasy a hořcově modré květy, – já jsem ho nazval *Cephalocereus nympha aurea Racek* – já se totiž jmenuju Ráček, račte vědět; nebo *Mamillaria colubrina Racek*; nebo *Astrophytum caespitosum Racek*; pane, tady jsou takové zázračné možnosti! Kdybyste věděl -

Počkajte, přerušil jsem ho; a v čem jste ty kaktusy odnášel? Prosím za řadry, řekl stydlivě. Ono vám to tak krásně píchá. Poslouchejte, já už jsem neměl to srdce ty kaktusy mu vzít. Víte co, řekl jsem mu, já vás dovezu k starému panu Holbenovi a ten už vám utrhne obě uši.

Lidi, to vám bylo, když ti dva se sčuchli! Celou noc zůstali ve skleníku, než obešli těch šestatřicet tisíc hrnčků. Holane, řekl mně starý pán, to je první člověk, který dovede ocenit kaktusy. A než uběhl měsíc, starý pan Holben s pláčem a žehnáním vypravil toho Ráčka do Mexika, aby tam sbíral kaktusy; oba svatosvatě věřili, že tam někde roste *Cephalocereus nympha aurea Racek*. Do roka jsme pak dostali takovou divnou zvěst, že pan Ráček tam zahynul krásnou a mučednickou smrtí. Přišel tam nějakým Indiánům na jejich posvátný kaktus Ĉikulí, který je, abyste věděli, vlastní bratr Boha Otce, a buď se mu nepoklonil, nebo jej dokonce ukradl;

mallonge, la amindaj Indianoj katenis sinjoron Ráček kaj sidigis lin sur Echinocactus visnaga Hooker, kiu estas granda kiel elefanto kaj surkreskita de dornoj longaj kiel rusaj bajonetoj, sekve de kio nia samlandano, sin fordoninte al sia sorto, elspiris la animon. Kaj tio estas la fino de la ŝtelisto de kakttoj.

zkrátka milí Indiáni pana Ráčka svázali a posadili ho na Echinocactus visnaga Hooker, který je veliký jako slon a posetý ostny dlouhými jako ruské bajonety, následkem čehož náš krajan, odevzdán ve svůj osud, vypustil duši. Tak to je konec zloděje kaktusů.